



# Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO  
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN  
Le Haut des Bourrellières  
17, rue Romain-Rolland  
85100 Le Château-d'Olonne  
P.C.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1999 - I

(JANUARO - FEBRUARO - MARTO)

# EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... nobeleco kaj nobeliĝo



Kaj pri imitema deziro.

# KULTURAJ KAJEROJ

## TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

| REDAKCIA KOMITATO                                                   | ENHAVO                                                                                                                                                                                                                                                |
|---------------------------------------------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| Jeannine VINCENT<br>26bis, rue de Milngavie<br>FR-49150 BAUGE       | paĝo                                                                                                                                                                                                                                                  |
| Pierre BABIN<br>17, rue Romain Rolland<br>FR-85180 CHÂTEAU D'OLONNE | El Grésillon 1<br>Esperanto tra la Mondo 2<br>La pac-ideo en la historio 3-4<br>Konsekvencoj de la imitema<br>rivaleco (F. Boyet) 5-8<br>Legendo de ĉi tie 9-10<br>Silvestro la arbarmastro 11-13<br>Por via Distro<br><br>La Vivo en Grésillon 15-16 |

## EL GRESILLON

Venontsomere la kastelo Grésillon vivos. Eĉ se nur viveti la kastelo povos, la novaĵo estas bonvena. Kompreneble la unua kaj la dua etaĝoj ne estos uzeblaj; sed la aliĝintoj povos kuniĝi en la klasĉambroj kaj en la teretaĝaj salonoj kaj ĉambroj... kaj ekstere en la parko. Bedaŭrinde ili tranoktos dise en la ĉirkaŭaĵo. Tamen ili povos interkonsenti por kune veturi inter la loĝloko kaj la kastelo.

Ekestos kelkaj malfacilaĵoj? Verŝajne jes; sed ne tro gravas ĉar pluvivos la Asocio, baldaŭ 50-jara, eĉ se ĝia posedaĵo eĉ se ĝia belega subtenilo ne bonfartas. Necesas sukceso de tiu kvarsemajna staĝaro, kies programo vi povas legi sur la lasta paĝo de tiu numero de la revuo., por kovri almenaŭ parton de la konstantaj elspezoj bezonataj por la diversflanka prizorgado de la kastelo.

**La Fonduso Sekureco daŭre ricevas viajn mondonacojn.**

**Sendu ilin al poŝtkonto en Nantes 1485-39 P, aŭ al nia UEA-konto Gres-y.**

## Pri la Revuo

Jam de 30 jaroj Kulturaj Kajeroj alportas al siaj legantoj legaĵojn kaj novaĵojn pri Grésillon. Troviĝis ĝis nun neniuj amiko por "preni la torĉon". Laciĝas la bonvolemuoj, kiuj, por kelkaj jam de la komenco, kolektas aŭ tradukas artikolojn, tajpas kaj enpaĝigas la tekstojn, fotokopias la foliojn kaj vinktas ilin. Nur la kovrilo estas presita de profesiulo. Kiu(j) pretas anstataŭi la nunan skipeton, kiu ĉesos sian laboron fine de tiu ĉi jaro? Bedaŭrinde estos se KK malaperos komence de la venonta jarcento!

# ESPERANTO TRA LA MONDO

**KAMPANJO 2000** – UEA invitas ĉiujn esperanto-organizaĵojn partopreni vastan tutmondan "Kampanjon 2000" por:

- popularigi la koncepton de nova pli justa lingvistika ordo;

- levi la prestiĝon de la internacia lingvo;

- levi la organizan kaj idean nivelon de la esperanta komunumo.

Tiu kampanjo koncernas ĉiujn esperantistojn en la lokaj grupoj, en la naciaj asocioj kaj internaci-nivele.

**PACKAMPANJO** – SAT proponis al UEA kune informi pri esperanto 200 porpacajn internaciajn asociojn. La du organizaĵoj kunlaboras por prepari la dosierojn, kiuj invitos la asociojn studi la eblecon uzi esperanton, kiel laborlingvon.

**EN IRANO** – La duan fojon esperanto-kursoj estis malfermataj en la matematika fakultato de Ferdosi-universitato, en Mashad, kun la partopreno de ĉ. 150 ĝelernantoj. Dank'al la nelacigebla prof. Saheb-Zamani artikoloj pri esperanto aperis en la gazeto Tosee. Plie, en la Revuo de Junulino kaj Junulo, oni anoncis la aperigon de esperanto-kurso. La Teheranaj esperantistoj festis la Zamenhofan tagon en verva etoso. Evidentiĝas, ke la politika situacio en Irano iĝas denove pli favora por esperanto.

**EN BERLINO** – La 84-a universala kongreso de esperanto okazos de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto en Berlino. La elektita temo de la kongreso estos: Tutmondigo: ŝanco por la paco?". La antaŭkongresoj traĉirados la limon inter Pollando kaj Germanio. La postkongresoj vizitos diversajn partojn de la lando.

**EN KARLOVY VARY (Ĉeĥio)** – De la 24-a ĝis la 31-a de julio okazos en Karlovy Vary la 72-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda.

**KELKAJ PLIAJ RENKONTOJ** – Internacia Junulara Kongreso en Zanka (apud la Balatona Lago en Hungario) 9/16-08. 14-a Ekumena kongreso en Gliwice (Pollando), 07/14-08.

Kanto-staĝo en Haguenau, 05/10-07. Informas: Odette Scheidel, 35 Grand'Rue, 67660- Betschdorf.

La "Sepa Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo" okazos de la 2-a ĝis la 9-a de oktobro en urbo Cambrils, provinco Tarragona (Katalunio-Hispanio). Informas: H.E.F.A. Apartado 15027, ES-08080-Barcelona (Hispanio).

Renkonto de Pluezek-Esperanto, en Bretonio, kursoj kun Ottilio Orellana Rojas, turismo, kantado en koruso. Informas: Roger EON, 5, Kervilin Izelan, 22470-Plouezek.

**ĈINA AVENTUREMO**– La 1-an de januaro kvin ĉinaj esperantistoj piede foriris el la urbo Lianyungang. Ili esperas atingi la centran oficejon de UEA, en Roterdamo, iam en la jaro 2000, post vojaĝo de 11 000 km, laŭ la fervojo Azia-Eŭropa, tra ses ĉinaj provincoj kaj ses landoj en la kontinentoj. Ili pensas transiri la kontinentlimon en Jekaterinenburgo kaj kalkulas pri la helpo de la esperantistoj survoje.

**NOVAJ ELDONAĴOJ**– Jen la tria verko tradukita de Christian Rivière: temas pri libro de Hervé Bazin: "La Verda Sanktejo" (franca titolo; "L'église verte"). La aliaj du tradukaĵoj estis: "La morto neniun forgesas" de Didier Daeninckx kaj "Sezaranoj miaj fratoj!" de Michel Prodeau.

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, UEA eldonis la libreton de UNESKO: "Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj".

"Kompreni kanguruon" estas vidbendo de Roman Dobrzynski pri la universala kongreso 1987 en Aŭstralio kaj pri tiu lando.

"Klara vortaro esperanta-araba" de Georgo Abraham, kun 15 000 kapvortoj. Post unu jaro sekvos ĝin la alidirekta volumo.

**EN FRANCIO**– Dum la somero, kvar staĝoj estos proponitaj en Grésillon (vidu la programon sur la lasta paĝo).

La Esperanto-centro de la Kvinpetalo, strato du Lavoir, 86410-Bouresse, starigis riĉan programon. Petu ĝin.

# LA PAC-IDEO EN LA HISTORIO

La homaro ĉiam sopiris al paco. La homaro ĉiam militis. Kia paradokso! La kaŭzojn de tiu fenomeno ni ne serĉas en tiu ĉi artikolo. Same estis ĉiam homoj kaj homgrupoj, kiuj serĉis elirvojon el tiu infera cirklo. Ili kredis, ke per siaj sistemoj aŭ principoj aŭ agadoj la homaro fine trovos tiun pacon. Tie ĉi ni prezentas nur man-plenon da tiaj klopodoj.

## FARAONO AMENOFIS IV (14-a j.c. a. K.)

En multaj lernolibroj pri historio li estas nomata "herezulo", ĉar li anstataŭigis la politeismon de la egipta pastraro per monoteismo. Nur unu sola Dio ekzistas: la suno. Interese por nia temo estas, ke li konsideris tiun Dion la patro de ĉiuj kreitaĵoj, kiuj do estas ĉiuj gefratoj, tiel en la lando Egiptio kiel en eksterlando. Do, tiuj fremdaj popoloj rajtas, same kiel la Egiptoj, havi sendependecon. Konsekvence li retiris la egiptajn armeojn el tiuj fremdaj landoj, tiel ke sub lia regado la egipta "mondregno" denove iĝis la limigita Egiptio. Kia unika ekzemplo! Sed post lia morto la armeestroj kaj la pastraro sukcesis repreni la povon. Ili nuligis lian vivolaboron, persekutis lian religion, revenigis la egiptan popolon al la allogaj antaŭaj agadoj de konkerado.

## LA ROMIA IMPERIO (5a jc. aK/5a jc. pK)

Tiuj realismaj kaj praktikaj Romianoj havis principon laŭ kiu paco estas ebla nur se fortika povo kapablas subpremi ĉiam kontraŭromian agadon. De tio: "Se vi volas pacon, preparu kaj preparu vin al la milito.". Fortega romia imperio devas konstante organizi, ordigi la socion, protekti ĝin kontraŭ "barbaraj" popoloj. Romiaj politikaj estroj ege bone klarigis tion al ribelemaj gentoj, per vortoj kaj per agoj. Fakte okazis tio, kion iuj inter ili antaŭvidis: tuj post la disfalo de la romia imperio venis jarcentoj da konstantaj militoj, kaj ruiniĝo de materia civilizo.

## LA KRISTANISMO

La nova forto, kiu rekonstruis materian, spiritan kaj moralan civilizon estis la krist-

anismo kaj tutspeciala la ordeno de la Benediktanoj. En la temo, kiu priokupas nin estas ĝi, kiu bremsis la batalemon de la kastelsinjoroj. La eklezio malpermesis batalojn unue dum kelkaj tagoj, poste dum tutaj periodoj kiel la fastotempo kaj la advento (la kvar semajnoj antaŭ la naskiĝo de Kristo). La monaĥoj sukcesis konvinki ne malmultajn kastelsinjorojn batali nur por protekti malfortulojn, nur por iu bona afero. Ĝi tiel kreis la kavaliridealon. De tio venas la bona famo de la esprimo "kavalira, kavalira ago". Ĝi estis entute grava kontribuo al pacigo de vastaj teritorioj dum iu tempodaŭro.

La eklezio havis ankaŭ siajn teoriulojn kiuj do teorie progresigis la pac-ideon. Inter ili la plej granda estis sankta Tomaso de Akvino (13-a jc.), la "doctor angelicus" (la angela instruanto), kies teologio estas ankoraŭ nun la oficiala instruado de la Romkatolika eklezio. Li starigis tri kondiĉojn por pravigi militon: 1) la alia partio estu tute, plene kulpa, ne parte kulpa. 2) ĝi devas scii, ke ĝi estas kulpa. Kaj la tria kondiĉo estas, ke ĝi rifuzas ripari la kulpon. Tiuj tri kondiĉoj estas nepraj. Sen plenumo de eĉ unu, neniu milito estas pravigebla. Vi tuj komprenas, ke neniam tiuj kondiĉoj estas plenumitaj. Tiel okazis, ke post la mezepoko, en la multe malpli severa Renesanco, la doktrino ankaŭ malstriktiĝis. Kaj la 17-jarcenta hispana Jezuito Suarez instruis, ke nur parta kulpo de la alia pravigas jam militon.

Sed ni revenu ankoraŭ momenton al la malfrua mezepoko, al la 15-a jc. Regis en Anglujo Henriko la VI-a, kiu fine malvenkis en la "centjara milito" kontraŭ Francujo. Fakte li ne estis milithomo, militreĝo. Li ekhavis originalan ideon por certigi la mondpacon. Li starigis lernejon alireblan nur por filoj de reĝoj. Se tiuj reĝidoj iĝas amikoj dum la studotempo, ili poste, sur la trono ne plu volos almiliti estintan studkamaradon. Ankaŭ tiu projekto fiaskis. Li ne pripensis, unue, ke estintaj amikoj povas poste iĝi malamikoj; kaj, due, ke reĝoj sur la trono ofte estas tre forte influataj de diversaj homoj, grupoj politikaj, ekonomiaj kaj aliaj. Nur lia fondaĵo restis: la Eton-College en Windsor.

Ni preterlasu la grandan pacifiston Erasmus kun liaj famaj "Dialogoj". Ni preterlasu eĉ la 17-jarcentan nederlandan

juriston Hugo de Groot (Grotius), kiu estas je la bazo de la internacia juro. Kaj ni ankaŭ preterlasu Kant, kiu en la verko "Al la eterna paco" rekomendas i.a. forpreni de la reĝoj la ĉiopovon.. Kaj ni tuj priatentu la kongreson de Vieno (1815), post la fina malvenko de Napoleono, por evidente vidi, ke paco ne estas ebla sen justeco. La diplomatoj volis tie restarigi la Eŭropon de antaŭ Napoleono kaj de antaŭ la franca revolucio, do de la "ancien régime" (la antaŭa reĝimo), kun ĉiuj antaŭaj sociaj, politikaj kaj aliaj maljustaĵoj. Bone konsciante, ke tio ne funkcios glate, ili ĵuris, ke kiam iu kolego renkontos ribelon, ili tuj venos helpi por subpremi la ribeladon. Tion ili nomis la "Granda Alianciĝo". Tri regantoj inter ili, nome de Aŭstrio, Prusujo kaj Rusujo, esperis povi sukcesi se ili almenaŭ regos por la bono de siaj subuloj. Tial ili promesis regi laŭ la sanktaj principoj de la Evangelio; kaj nomis tiun akordiĝon la "Sankta Alianciĝo". La sekvo? Dum la tuta 19-a jc. nur militoj kaj ribeladoj kun kulminpunktoj en 1830 kaj 1848.

En tiu vasta kadro de la historio de la paco, ankaŭ Dro Zamenhof okupas rimarkindan lokon. Ankaŭ li estis obsedata de tiu ideo, ke oni nepre eltrovu rimedon kontraŭ tiuj eternaj interbataladoj, kiujn cetero li mem vidis en sia urbo. Laŭ li estas du ĉefaj kaŭzoj, tra la tuta historio, de la intergentaj bataloj: la diverslingveco kaj la diversaj religioj. Do li kreis neŭtralajn mondlingvon kaj mondreligion. En la unue nomita li sukcesis, en tiu senco, ke Esperanto disvastiĝis tra la mondo. Rilate la duan li havas ankoraŭ tre malmultajn adeptojn, kaj oni ne povas paroli pri movado komparebla al la lingva movado.

Ni pasu al la 20-a jc. La amerika prezidento Wilson antaŭmetis, tuj post la unua mondmilito planon, kies efektiveco certigus la mondpacon. El la dekkvar punktoj mi citas du por ke vi vidu, ke ĝi estis nerealisma plano: 1) Nova kaj justa disdivido de la kolonioj. Tio implicus, ke Anglujo cedus almenaŭ tri kvaronojn de sia koloniaro; kaj Francujo certe la duonon. 2) Alia punkto estis, ke traktatoj inter registaroj ne plu estu sekretaj, ĉu militaj, ĉu komercaj aŭ kiaj ajn. Tria ekzemplo: por ĉiuj ŝtatoj estu libera navigado sur ĉiuj maroj, markoloj k.s. Tio implicus liberan navigadon ankaŭ por militŝipoj tra Dardaneloj, do ankaŭ por Rusujo.. Fakte nur unu

punkto estis realigita: starigo de "Ligo de Nacioj". Ĝia ĉefa celo estis: senarmigo de la ŝtatoj. Kiom da ŝtatoj faris tion? Danujo.

Federacia Eŭropo: kvankam la ideo ne estis tute nova ĝi ekhavis fortan eĥon pere de la agado de grafo Coudenhove-Kalergi, ĉefdevena nederlanda politikisto. Li kons-tatis, ke per la traktato de Versailles ekestis novaj ŝtatoj, Polujo, Ĉeĥoslovakujo, Jugoslavujo k.a., kun siaj pliaj landlimoj, do kun novaj fontoj de konfliktoj ktp. Li klopodis konvinki ŝtatgvidantojn pri la neceso de federaciigo de Eŭropo. Li ne volis kunlaborigi popolamasojn. Tamen en ĉiuj ŝtatoj ekestis multnombraj pacifistaj movadoj. Regis ĝenerala kredo, ke kaŭze de tre forta internacia pacifista movado tiu mondmilito eble estos la lasta milito. Pro la fakto, ke ankaŭ la Esperanto-movado en sia celo internacipaciga, la publikaj kursoj konis grandan sukceson. Kurson kun ĉirkaŭ 100 partoprenantoj, ankaŭ en malgrandaj urboj, ne estis esceptoj. Sekve de tiuj faktoroj ekestis interamikigo. Ni citu la agadon de politikistoj kiel Aristide Briand, Streseman, Rathenau kaj la agadon de francaj eksmilitintoj. Multegaj libroj, broŝuroj, revuoj propagandis pacifismon kaj teorie kondamnis la militon sur bazoj de i.a. moralo. Unu libro, kiu iĝis preskaŭ la biblio de teoria-morala pacifismo estas "Weltkirche und Weltfrieden" (Mondeklezio kaj mondpaco) de la germana dominikano Fr. Stratmann. Sed preskaŭ identaj kaŭzoj, kiuj eksplodigis la unuan mondmiliton ekminacis la mondon ek de 1930, kaj fine estigis duan mondmiliton. Kaj post tiu ankoraŭ pli terura milito, denove la plej granda de la historio, oni tamen ree devis rekonstrui; kaj vole nevole reripensi tiun ĉiam revenantan fenomenon de internaciaj militoj. Ree ekstaris politikistoj, kiuj dediĉis ĉiujn siajn fortojn por malebligi tiajn katastrofojn. Unu elstaras, kiel nova Kristo: la mahatma (granda animo) Gandhi. Li volis sendependecon por sia lando, Hindujo, kaj sukcesis. Sed li predikis ankaŭ la metodon de ne-perforteco. Je iu momento li havis eble trionon de la hinda popolo kiel adeptaron. Sed li estis mortigita pro religi-socia fanatismo. Kaj en tiu klopodo li fine malvenkis. La bazo de lia teorio, kiu oni preskaŭ nenie legas, estas la jena: en ĉiu homo, ankaŭ en la plej malbona, plej malvirtiga, kuŝas io bona. Eble tio estas tre profunde kaŝita pro ĉiaj okazintaĵoj en lia vivo. Tamen tio estas en li. Oni povas

# PSIKOLOGIAJ KONSEKVENCOJ DE LA IMITEMA RIVALECO

**ENKONDUKO:** Mi jam prezentis la tezon, laŭ kiu la evoluo ekde la antropoidoj al la homo okazis per pliampleksigo de la imitemo, kiu superis la protektantan instinkton de la mamulaj socioj. Pro tiu malapero de la instinkto la homoj, por pluvivi, bezonis eltrovi homan solvon, kiu estis la kolektiva murdo, el kiu naskiĝis la sistemo de ritoj, tabuoj kaj mitoj, kiu karakterizas la malmodernajn homajn sociojn, kaj poste evoluis al la nuna stato de la modernaj sociaj institucioj. Mi tiam montris la iamajn sociajn konsekvencojn de tiu prakulturo, sed oni ankaŭ povas studi la nunajn konsekvencojn de tiu prahoma konduto en psikologio.

**IMITEMA DEZIRO NEPRE KONDUKAS AL SENOBJEKTA RIVALECO:** Komence iu homo deziras ion, kaj tio estas natura bezono. Sed pro imitemo, alia homo deziras precize la samon: objekton, konduton, socian situacion, ktp. Tiam la homo suferas la rivalacon ne ĝin perceptante klare, ĉar la imitemo estas senkonscia same kiel la reala fonto de tiu rivalado. Por klarigi tiun misteran rivalacon, la homo eltrovis la mitojn, kaj por kuraci tiun malsanon, ĝi praktikis, kiel mi jam diris antaŭe, unue originan murdon kaj poste la tabuojn kaj la ritojn. Sed pro tiu rivala deflankiĝo, la deziro nepre kondukas al malsukceso. Kiam la homo sukcesas akiri la celitan objekton, se, pro la psika evoluo, granda estas la diferenco inter la reala objekto kaj la objekto plibeligita pro la rivalado, tiam la homo suferas pri la diferenco inter revo kaj realo, kulpigas la objekton kaj la rivalon, kiu fariĝis por ĝi modelo. Kiam oni atingas sufiĉan diferencon inter realo kaj idealigita celo, tiam, kiu ajn estas la materia situacio la homo psike malsukcesas.

El la rivalado naskiĝas paroj, kiujn estras senkonscia reciproka perforto. Unu trudas sian forton al la alia, kiu siavice, uzure reciprokas. Pro la influo de perforto, la modelo fariĝas kontraŭmodelo; ne plu temas pri imitemo sed nepre rivala serĉo de diferenco. Dum la evoluo de la paro, la celo de la rivalado ŝanĝiĝas. Unue estis reala objekto, kies psika valoro kreskas dum akriĝas rivalado, sed poste la valoro transiras al la rivalo; por la spektantoj

la rivalado estas senkiala; kiam oni de-<sup>x</sup>mandas la rivalojn, ili respondas per "prestiĝo", "honoro",...tio estas situo rilate al la alia. Tiam oni povas racie diri, ke la homoj batalas por nenio, dum pasie kaj subjektive ĉiu estas preta oferi ĉion por venki.

Fakte la mekanismo de la imitema rivalado baziĝas sur la fascino, kiun la rivalo trudas al la deziranto. La deziro, kiu unue rilatis al reala objekto, fariĝas deziro imiti la rivalon, tio estas pli kaj pli rivali kun tiu homo, kiu, vole nevole opozicias kaj estas mem la obstaklo, kiu poste estos nomata "leĝo" fare de la socio, aŭ "supermio" fare de la psikanalizistoj. Oni povas pravigi tiun tezon rimarkigante, ke nur malpermeso, kiu fontas en opozicio de rivalo povas naski humiliĝon. Se "leĝo" malpermesas, oni obeas aŭ ne, sed oni ne sentas ofendon, sed en la imitema rivalado ĉiu el la du opoziciuloj sentas sian personon humiliĝitan fare de la sukceso de la alia, kaj nepre deziras supervenki ĝin, por pruvi al si mem kaj al la aliaj, ke li ne estas malsupera. Per tiu mekanismo, la deziro pli kaj pli ampleksiĝas ĝis plej gravaj psikaj konsekvencoj, kiujn mi pli poste detaligos, sed estas utile rimarki, kiel tiu mekanismo de la imitema deziro ludas gravan rolon en la homa naturo kaj la homa socio.

## IMITEMA DEZIRO KAJ PERFEKTIGO DE LA

**HOMA PERSONECO:** Unue la imitema deziro apudas la naskiĝon de la homa konscio. Se, ĉiufoje kiam estas "natura deziro" aperas samtempe por la homo ankaŭ rivalo, la homo alkitimiĝas al la ekzisto de paroj, kiuj opozicias, kaj oni povas racie hipotezi, ke en tiu bildo de paro kaj opozicio troviĝas la basiso de konsciigo; fakte, ĉiuj psikologoj akordiĝas por konstati, ke konscio naskiĝas pro ekzisto de obstaklo, kiu ajn estas la naturo de tiu obstaklo. Laŭ ĉi tiu tezo, la unua fundamenta obstaklo estas la rivalo. Due la imitemo apudas ankaŭ la lülilon de lernado. La homo lernas per imito, kiu, trans la instinkto karakterizas la homan destinion, kaj permesis la socian evoluon de la kulturo. Sed kiam iu homo lernas de mastro, ĝi pli kaj pli

sukcesas kaj iam fariĝas tiel lerta, kiel la mastro, kaj tiam naskiĝas rivaleco. La mastro fariĝas ĵaluza kaj komencas malfidusian disĉiplon, sed tute ne klarigas tiun rivalecon. Samtempe la disĉiplo, kiu ankaŭ ne vidas la rivalecon, pli kaj pli deziras imiti la mastron kaj tiel kreskas la progreso.

La progresemluloj deziras liberigi la homon de la sociaj katenoj, kaj por tio, penas malaperigi la sociajn leĝojn, modernajn restaĵojn de la tabuoj. Sed fakte, tiujn sociajn limigojn anstataŭas la imitema rivaleco; la konkurenco multe kreskas kaj portempe progresigas la socion. Sed iam la rivalaj opozicioj aperas kiel pli sklavigaj ol la sociaj bremsoj. Kompreneble oni povas klarigi tiujn malfacilaĵojn per novaj mitoj pri raso, klasoj, aŭ patro, sed tiuj modernaj mitoj, same kiel la antikvaj, nepre kondukas al amasa murdo, kaj tio ne estas feliĉiga solvo. En la moderna mondo, pro la malfortigo de la tabuoj, kaj en la modernaj socioj ankaŭ de la hierarkioj, la deziro ŝajnas natura kaj fleginda, ĉar ĝi estas ne nur rimedo de iluzia feliĉo, kiel ni ĵus vidis, sed ankaŭ motoro de la progreso. Sed la socia senlimeco de la deziro kondukas al libera evoluo de la imitemo kaj pliampleksigo de tiu rivalado, kiu kondukas ne nur al malsukceso, ne nur al malfeliĉo sed ankaŭ al psikaj difektoj.

#### IMITEMA DEZIRO KAJ PSIKAJ MALSANOJ:

La plej simpla kaj paca imitemo okazas en hipnoto. Tiam la hipnotigito neniam konfuzas sin kun la hipnotiganto, kiu estas la "alia", al kiu plaĉas obei per imito de la deziro. En tiu situacio, kiu cetere similas al la rilato inter superulo kaj malsuperulo en mamulaj socioj, ne naskiĝas rivaleco, la imitado ne kondukas al krizo. La religiaj aŭ ritaj trancoj similas al la ordinara hipnoto. La fidelulo, kiu deziras akcepti en si mem spiriton, dion aŭ iun ajn favoran potencon, unue trejnas sin en imitemaj kondutoj. Ĝi ripetatas monotonan frazon, aŭdas ripetitajn ritmojn, korpore dancas laŭ ritaj ritmoj. Ĝi uzas diversajn rimedojn por forigi sian personecon kaj imiti la sintenon de la dezirata modelo. La diferenco kun la nura hipnoto kuŝas en la fakto, ke, provizore, la fidelulo kredas sin dio, partoprenas la vivon de la imitata estaĵo. Sed tiuj trancoj estas nur provizoraj kaj post la tranco la fidelulo retrovas sian personecon, kiu eĉ se ĝi estas sentata kiel parto de pli granda estaĵo, tamen konservas sian proprecon.

En la demonhavadoj la situacio estas inversa. Kiel bone studis Huxley pri la demonhavantinoj de Loudun en la 17-a jarcento, temas pri histerio, kie la malsanulo sentas sin tute individua, sed samtempe invadita de fremda kaj malamika estaĵo, kiu suferigas lin. Tia situacio situas inter la ĵus aludita tranco kaj la psikozo pri kiu poste temos; En tiu kriza situacio la fino povas okazi nur per rito: jen pure simbola rito religia: la ekzorcisto forpelas la demonon, jen per murdo de la malamiko, kio fakte okazis en Loudun, kie iu senkulpulo estis mortkondamnita de religia tribunalo. Tiu religia decido tute memorigas al ni la ritajn murdojn de la praepoko, necesajn por pacigi la homojn.

Ankaŭ la rilatoj inter skizofrenio kaj komunikado estas interesaj por nia studo. Laŭ Bateson skizofrenio naskiĝas en infano kiam ĝi ricevas de la sama persono, ĝenerale la patrino, mesaĝojn kontraŭdirajn. Tiam la infano, kiu ne povas plenumi la dezirojn kontraŭdirajn unue suferas kaj poste devas eskapi tiun turmenton per plena fuĝo el la komunikado, ĝenerale lingva. Tia infano ne plu komprenas la parolon kaj ne plu parolas; ĝi fakte rompas la komunikadon, kiu fariĝis por ĝi netolerebla. Estas interese kompari tion kun la teorioj pri la modernaj interkomunikiloj. La mesaĝo efikas al la celato sed ankaŭ retroefikas al la celanto. Tiu influo retroira agas sur la venonta mesaĝo kaj la sistemo evoluas. Iam la diferencoj kondukas al amortizo de la kontraŭdiroj; tiam okazas krizo, kiu detruas la komunikadon. Kompreneble tiuj ekzemploj estas interesaj por la fenomenoj en iu paro de rivaloj de la imitema deziro, kiam la opozicio fariĝas netolereblaj okazas krizo, kies konkludo povas esti rompo de la komunikado: tio estas skizofrenio.

La lasta ŝtupo al infero de la psikaj malsanoj estas la psikozo, kiu aperas en la paro de la imitema deziro, kiel kunfandiĝo de la personecoj. Laŭ la tezo de la origina ofero, la homoj fariĝis homoj per individuigo post la ofero. Antaŭe la homoj rilatis nur per krioj, ne kapablis pensi, kaj batalis en mensa konfuzo. Por klarigi aperon de psikozo sufiĉas pensi, ke, en la konflikto interna al la paro reaperis krizo tiel grava kiel estis la origina krizo. Oni scias, ke el tiu krizo la homoj eliris nur per kolektiva murdo. La homo revenas al la antaŭa situacio antaŭ la homiĝo. La personeco

detruiĝis, la malsanulo kredas sin aliulo, ĝenerale la rivalo. Teorie, se la imitema deziro antaŭeniras sen bremsi ĝi kondukas al la krizo, kiu fondis la homan kulturon, pere de la fundamenta ofero, kaj poste de la rifo. Sed kiam estas nek oferoj nek ritoj, la tuta libereco de la deziro kondukas nepre aŭ al individua murdo (inkluzive de memmortigo), aŭ al psikozo, frenezo. Praktike, la homoj evitas frenezon pere de la restaĵoj de ritoj kaj pere de la modernaj mitoj, kiuj kondukas al militoj. La teorio de la imitema rivaleco permesas klarigi la transiron de la besto al la homo, de la infano al la matura homo, la lernadon kaj la kulturon. Per la sama mekanismo oni povas inverse klarigi la perforton, la malordon, la konfuzon kaj la frenezon.

### IMITEMA RIVALECO KAJ SEKSOLOGIO:

La imitema deziro naskas, tra la rivaleco, iun obstaklon al la deziro. La deziranto ne komprenas la kialon sed konstatas la fakton, kaj fine konkludas, ke la valoraj objektoj estas la plej malfacile atingeblaj. La modelo fariĝas tute nature obstaklo, sed la deziranto, kiu serĉas valorajn deziraĵojn, reciproke faras de la obstaklo la modelon. Ĉar la deziranto obstine serĉas la obstaklojn, kiuj nepre vundas ĝin, tial la observanto, kiu ne konas tiun mekanismon kredas, ke la deziranto serĉas la doloron kaj nomas ĝin masohismo. Reale la deziranto taksas la valoron de la deziraĵo laŭ malfacilaĵoj kaj ju pli ĝi suferas despli ĝi fieras atingi la plej grandajn valorojn. Kiam la homoj ne nur vivas tiun "masohismon" sed krome reprezentas ĝin en siaj seksaj rilatoj, tiam la amoro estas nomata sado-masohisma. Fakte en tiu situacio la homo, kiu rolas en reprezentaĵo, provas trovi la ĝuon ne en la ĉefa seksa rilato, sed en rilato kun la alia. Kaj tiu rilato estas tipe rivaleca; tio signifas ke la homo sentas sin aŭ malsuperulo, kiu estas despli feliĉa, ke la alia estas pli teruriga, aŭ superulo, kaj tiam ĝi deziras elmontri tiun superecon. En la du kazoj la ĉefa karaktero de la deziro estas la transiro de la objekto mem (seksaj rilatoj) al la kontraŭulo, kaj kompreneble tia rilato al rivalo estas nepre konflikta, konflikto kiu povas esti fizika aŭ morala laŭ la cirkons-tancoj. La sinteno de samseksemuloj klarigeblas per sama situacio. Ekzemple la junulo estas fianĉo de junulino. Li renkontas alian viron, kiu aperas al li kiel modelo, ĉar tiu viro kutime sukcesas kun la virinoj. Sed denove, laŭ nia kutima

transiro, la junulo tiel admiras la viron, ke la deziro transiras de unu al la alia kaj la modela viro fariĝas la amato de la junulo. Freud aludas al kaŝita (li diras latent) samseksemo kaj pri tio citas Dostoevskij. Kaj fakte en la verkaro de tiu aŭtoro la plej interesa ekzemplo estas tiu de la "eterna edzo". La ĉefrolulo de la romano estas viro, kiu elektas la virinojn uzante la jenan kriterion: se la virino estas elektita de "fakulo" tiam ŝi indas je amo. Per tiu metodo la "edzo" elektas nur virinojn, kiuj havis, havas aŭ havos kromedzon, ĝuste tiun, kiu konsilas. Kompreneble la situacio en la romano estas pli komplika sed la kerna reago de la eterna edzo estas tiel tre fidele resumebla. Ĝi estas tipa ekzemplo de la transiro de la deziro. La viro ne "deziras" esti kokrito, sed ĉar li sisteme elektas la amantinojn de sia "kriteria amiko", vole nevole, li serĉas la kokritecon kaj ricevas ĝin.

**PSIKANALIZA MITOLOGIO:** Dum siaj studoj Freud multfoje renkontis la triopon: la objekton de la deziro kaj la du konkurantojn, kiuj samtempe deziras ĝin. Depost Platono la homoj, kaj speciale la scienculoj kredas, ke ĉio havas modelon ie ajn en la mondo. Tial Freud serĉis tiun modelon, kiu ekzistas mite en la Edipa rakonto, sed en la realaĵo li sukcesis trovi nur unu tian tipon, tio estas la familia triopo.

Sed la triopo de Freud ne bone klarigas la situacion, ĉar li diras, ke la filo deziras imiti la patron, sed li ne diras, ke tiu imitemo eksplicite rilatas al la deziro pri la patrino. Kontraŭe, en sia teorio Freud diras, ke la infano deziras sian patrinon denaske, kaj pro tio li ligas en la teorio de la "libido", la buŝan plezuron de la suĉinfano al la seksa deziro. En la teorio de Freud la bildo de la patro estas unue rivala, kaj "leĝa", obstakla, sed ne konkurenca pro antaŭa sama deziro. Krome, la teorio de Freud ne kapablas respondi al la demando: "Kiel la malsanuloj kopiis la familian triopon?". Kaj ĉar la teorio ne sufiĉas, tial Freud eltrovis alian kroman instinkton, kiu estas la "instinkto pri morto". Cetere, eĉ kun tiu kromaĵo, la teorio ne povas klarigi, kial tiu fenomeno ripetiga. Ekzemple, kial iu viro serĉas rivalojn pli kaj pli prestiĝajn...dum la familia triopo estas ĉiam la sama. Kontraŭe, la imitema deziro, kiu kondukas al rivaleco, tre simple klarigas tiun situacion de triopo, kaj tre ĝenerale, ne nur pri seksaj aferoj. La imitema deziro nutras sin de la malsukcesoj

, por serĉi rivalojn pli kaj pli valorigajn.

Por distingi la situacion, kie la rivalo estas samtempe modelo kaj obstaklo, Freud imagis la ekziston de du edipaj sistemoj: la normala kaj la nenormala. Kaj por pravigi tiun novan nocion, li eltrovis iun latentan samseksemon de la malgranda infano al la patro. Tiu samseksemo de la filo al la patro estas senpruva hipotezo neniam renkontita ja tute ne necesa, kiam oni uzas la imiteman rivalecon. Ĉar la jam trovitaj mitoj ne klarigas ĉiujn situaciojn Freud eltrovis poste la duseksismon kaj la narcisismon. Li distingas du dezirojn: la objektan deziron, kiu estas ĉefe vira kaj la narcisan deziron, kiu estas esence ina (li diras!) Kaj li priskribas konduton, kiun li konsideras kiel karakterizilon de la virinoj. Fakte, kiam oni atente studas tiun "karakteron" oni konstatas, ke ne temas pri seksa karaktero sed simple pri strategio de ĉiuj koketulinaj. La koketulino scias, ke la deziro altiras la deziron, tial ŝi ŝajnigas deziron por altiri la deziron de la viroj, kaj ju pli multaj estas la dezirantoj, despli dezirinda estas la virino. Sed la objekta deziro rilatas al la narcisa deziro laŭ tute simpla regulo: la imitemo kaj la imitema teorio senutiligas ĉiujn mitojn eltrovitajn de Freud.

**LA LIBERIĜO EL LA INFERO DE LA IMITEMA DEZIRO:** Estas facile rakonti, ekzemple en romano, kiel iu homo sukcesas liberiĝi de la imitema deziro. Kontraŭe estas tre malfacile agi mem al sia persono. Por liberiĝi necesas transiri ĉiujn mitojn, kiuj invitas kulpigi la aliajn pro niaj malfacilaĵoj. Kaj ĉar nia homa kulturo baziĝas sur tiuj mitaj kredoj, la liberiĝo povas okazi nur se oni detruas en si ĉion, kion konstruis la homa kulturo: la "mio", la "persono"... Tia rompo ekzistas kuĥime jen per psikanalizo, jen per religia krizo.

En la kristanaj tekstoj, la "skandalo", kiun oni tradukas foje per skandalo, foje per falo, estas fakte la imitema deziro, aŭ pli ĝuste, la obstaklo de la rivalo. En la evangelioj ĝi estas la kontraŭo de la "amo" laŭ kristana koncepto. Por interpreti la frazojn (Mateo 18:5-9) kie Jesuo diras "Se via mano aŭ via piedo estas por kaŭzo de falo, tranĉu ilin kaj forĵetu ilin..." la Freudistoj elvokas kastradon, kiu tute ne klarigas la tekston. Kontraŭe, se oni komprenas, ke la "falo" (skandalo) estas la imitema deziro, oni povas kompreni, ke por forigi tian gravan malamikon estas bone perdi parton de sia korpo.

Kiu ajn estu la nomo kaj simbolo, kiu montras la imiteman deziron, (la azianoj parolas pri "vualo" kaj "ŝajneco"), en ĉiuj teorioj, religiaj oni provas ŝirmi la homon kontraŭ la imitema deziro, kiu kondukis la prahomojn al teruraj buĉadoj, el kiuj ili eskapis nur per ritaj murdoj, kies moderna formo estas la milito. Oni povas diri, kun la religiuloj kaj la antikvaj saĝuloj, ke homo estas libera nur kiam ĝi komprenis tiun mekanismon, kiam ĝi liberiĝis el la ŝajneco de la deziroj aŭ el la origina peko per tute alia "nova" sintenado rilate al la mondo kaj al la aliaj homoj; Oni ankaŭ povas diri, ke la nuna tendenco de la moderna mondo, kie regas la senbremsa deziro kaj la konkurenco, ne faciligas tiun konverton al paco kaj amo.

F. BOYET

"La Paco-ideo" (sekvo de paĝo 4)

surfaciĝi tiu(j)n bona(j)n eco(j)n se oni faras al li amajn agojn. Verŝajne tio estas vera. Sed por tiel agi devus esti kvazaŭ perfektulo. Mi volas fine citi alian homon: Robert Schumann, kiu kelkfoje ŝanĝiĝis je nacieco; Elzacano, kiu militis kontraŭ Francujo dum la unua mondmilito kaj kiu poste fariĝis franca landa ministro! Estas li, kiu, laŭ tuta verŝajneco, malebligis reajn militojn inter la okcidenteŭropaj ŝtatoj. Sed tio estas ankoraŭ ne historio, ja aktualaĵo.

Okazas ankoraŭ ĉiutage militoj. Sed ĉu ankoraŭ okazos mondmilito? Mi ne estas profeto. Du gravajn aferojn mi konstatas. 1) se ni trarigardas la historion, ni vidas, ke la areoj meze de kiuj ne plu okazas militoj pligrandiĝas. Estis tempo dum kiu la urboj intermilitis. Poste, kiam la potenco de la grafoj pliiĝis, ne plu urboj sed grafolandoj intermilitis. Poste kiam la povo de la reĝoj pliiĝis ne plu feŭdaj landoj sed reĝlandoj intermilitis. Nun parto de Eŭropo estas sur vojo al unuiĝo; eble aliaj sekvos. 2) Pro la progresoj de tekniko kaj vojaĝeblecoj, la homoj vizitas ne nur aliajn landojn, sed ankaŭ aliajn kontinentojn. Ili pli kaj pli interkonatiĝas. Tio kreas novan etoson, mondvanan etoson. Mi scias, ke grandaj surfacoj de la tero ne jam partoprenas tion. Sed ĝenerale oni kredas, ke ni iras al iu mondkulturo kaj mondcivilizo. Tiu fenomeno estas esperiga. Ĝi certe ankoraŭ ne estas garantio. Sed ĝi progresu dum mondkatastrofo ne jam okazas. Ĝi estas plia forta kialo por disvastigi nian lingvon.

D-ro Fernand ROOSE

(el prelego - Grésillon - 1983.)

# LEGENDO DE ĈI TIE

En la franca urbo La Roche sur Yon ekzistas verk-ateliero, "Nacia scenejo la Karuselo", kiu eldonis ilustritan kolekton de tekstoj individue aŭ kolektive verkitaj de la membroj. La titolo de la deskarto estas elvokiva: " Skribi mian urbon ". La legendo, kies traduko sekvas estis komune verkita de 9 personoj.

Iam staris du rokoj. Tiel granda estis ilia reciproka amo, ke, iun tagon, ili decidis unuiĝi. Tial ekfulmis sparko kaj aperis juna, bela drako. Ĝi havis tri kornojn kaj kvin okulojn. Tiel longa ĝi estis, ke la ekstremo de ĝia vosto estis nevidebla. Vico de grandegaj krestoj alliniigis malsupren laŭlonge de ĝia kolo. Ĝia haŭto estis tiel dika, ke ĝi similis vivantan ŝtonaĵon. Drak'Jon (tiu estis ĝia nomo) ĉirkaŭrigardis, diris al si, ke nenio estas farinda en tiu heĝo-lando. Pro enuo ĝi fermis siajn okulojn kaj endormiĝis por du aŭ tri jarcentoj. Ĝiaj palmaj piedoj baniĝis en la koto de la riveroj; ĝia dikega vosto batis la akvajn plantojn. Ĝia ronkado kaj ĝia ŝrado kraketigis ĝian haŭton en krustojn. Elstarigis muroj kaj konstruiĝis domoj.

Sur la dorso de Drak'Jon naskiĝis centhoma vilaĝo. Sed la loĝantoj kaŝiĝis en ŝtoneca silento; tiam ne ekzistis vortoj. Apenaŭ aŭdiĝis sonoj, ĝemetoj el la subtegmentaj ĉambroj. Inter la muroj la virinoj kuiris blankajn fazeolojn kaj rostis pan-tranĉaĵojn. Gemaljunuloj fikse rigardis la lastajn sunardaĵojn. La vilaĝanoj ploris en korprema silento. Larmoj fluis sur la kotmakulitaj, flikitaj pantalonoj. Ekstere, la vento-voĉoj tintadis kontraŭ la senkaŭzajn ridojn de la kamparanoj enŝlositaj en sia silentemo kvazaŭ fatale.

Meze de la vilaĝo loĝis belega junulino; ŝia longa hararo surkaskadis ŝiajn ŝultrojn. Ŝi surportis longajn kolorajn jupeojn, kiuj ondis laŭ la vento. Ĉiumatene ŝi prenis sian kruĉon kaj iris ĝin pleni per akvo por la vilaĝanoj. Vintre ŝi rompis la glacien de la marŝetoj kaj lagetoj. Printempe ŝi plenigis sian kruĉon el la profundaj fontoj. Nur ŝi sciis kie trovi ilin. Ŝi ne tuj ĉerpis ĝin. Ŝi aŭskultis ĝian vojaĝon, ĝian longan iradon sur la dorso de la ŝtonetoj, ĝian lertan kuradon en la malvarmeta fluejo de la rivero. Kiel agrable estis ripozi meze de la foliaro kaj de la muskoj. La junulino ridis pri la akvo, kiu sin kaŝis timeme aŭ ludeme.

Iun tagon, el la akvo-murmuro ŝi aŭdis la unuajn vortojn, la unuajn rakontojn, tiujn pri la pluvo, pri la vento, pri la tondro, pri la steloj. Ŝia kruĉo tiam pleniĝis per akvo kaj vortoj, akvo por sensoifigi, vortoj por ĝin deziri kaj nutri la pensadon. Tiam la junulino portis la akvon al la buŝoj de la vilaĝanoj kaj trinkante la parolojn de la akvo, ili siavice aŭdis ĝian murmuron. Sur la pinto de iliaj langoj naskiĝis vortoj kaj la signifo-muelilo. Kvazaŭ nevole iliaj lipoj ekmoviĝis. Anstataŭ la kutimaj ĝemoj kaj krioj, la vortoj malimplikiĝis en iliaj buŝoj. Ridantaj ili ludis ĵetante parolojn al la ĉielo. Ĉiufoje iu kaptis ilin. Unu donis sian parolon; alia provis ĝin teni.

La tutan tagon la junulino ĉerpis la akvon, verŝis la vortojn en la soifantajn buŝojn. Ŝiaj longaj haroj tuŝetis la lipojn, kiam ŝi klinis sin por ilin sensoifigi. Ĉiu revis pri la malvaj flor-grapoloj, kiuj kaskade rulis longe de la ŝtonmuroj ; Glicinea, tute nova vorto por diri tiun mirindaĵon: la belecon de floro kaj tiun de junulino. Tial jam kiam montriĝis la nebul-eta vualo de tagiĝlumo, la nomo Glicinea eŝiĝis en ĉiuj vojaĝuloj de la vilaĝo. Voĉoj vokis la akvo-portistinojn kaj Glicinea klopodis pri siaj kruĉoj; ŝi iris de unu al la alia. La geknaboj kantis ĉirkaŭ ŝi, la gepatroj babilis, la plej maljuna viro rakontis historion.

Okazis, iun matenon, ke la vilaĝa koko ne kantis. Tiun tagon la vilaĝanoj pludormis multe pli malfrue ol kutime. La maljunulo ne plu bezonis la vekantan kokon. Kiel ĉiun matenon li aŭskultis sian lacan korpon. Ankoraŭ ĉifoje li konstatis, ke ĝi glate funkcias, kaj li ellitiĝis. Li eliris kaj staris sur la sojlo de la pordo por atendi la unuajn tagiĝajn briletojn.

Kiam aperis la suno samtempe peza silento ŝvebis super la vilaĝo. "Tiu ĉi mateno ne estas ordinara," diris al si la maljunulo. Siavice Glicinea vekigis. Tiam unu post la alia, ĉiuj vilaĝanoj elhejmiĝis, pezaj je dormemo. Vidante la malserenan mienon de la maljunulo neniu diris eĉ vorton. Glicinea, la unua, sentis sur sia haŭto aerblovon sekan, kaj varman, kiel fajro-lango. Tiu blovo ŝvelis, ampleksiĝis, kaj vera tempesto impetegis sur la vilaĝon. La vilaĝanoj kuris serĉante ŝirmejon kontraŭ la varmegaj vento-puŝoj. Tiam ili aŭdis la hufbruegon de galopeganta ĉevalo. La

besto estis monstra, alta kiel tri domoj. Rajdis ĝin giganta, severmiena, malbeleaga viro. Lia korpo ne estis farita el ostoj karno sed el polvoj kaj sableroj kirlantaj kaj varmegaj. La rajdanto tragalopis la vilaĝon, kiel fajro-bulo. Fulmrapide sekigis la putoj kaj marĉetoj, senakvigis la riveretoj, elĉerpigis la fontoj. La vilaĝanoj posedis nur siajn okulojn por plori sed eĉ larmoj ne plu ekzistis. Post kelkaj tagoj iliaj buŝoj fariĝis sekaj, iliaj ventroj brulvarmaj kaj ĉiu eĉ eta movo dolora. Ili restis senmovaj enmurigitaj en silento. Nur Glicinea ĉiu-matene foriris kun sia kruĉo kaj daŭrigis sian serĉadon. Ŝi tiel forte deziris la revenon en la vilaĝon de kantoj, ridoj, rakontoj! Senlace Glicinea serĉis akvon. Iun vesperon, elĉerpita, ŝi falis pro lacego kaj kuntiriĝis en la sekigita fluejo de la rivero. De tiam la senakvaj, senvortaj vilaĝanoj scipovis nur krii, ploregi kaj kolere pied-frapi. Kelkaj fosis truojn ie ajn. Ili esperis lokaligi akvo-flueton aŭ eĉ guteton. Tial ili fosis, fosadis senhalte.

Kaj Drak'Jon, kiu duondormanta unuatempe kredis, ke familiaraj muŝegoj ludas, sentis specojn de pikiloj traborantaj lian epidermon kaj profundigantaj en ĝian korpon tiel graseta sed tiel sentema, sube. Tiam li ekpensis, ke io estas farota, ĉar tio transiris elteneblon. La bruego plenigis liajn tre, tre sentemajn orelojn. Troiĝis por normale farita drako! Li do decidis grande malfermi siajn kvin okulojn kaj serioze pripensi. Li estis vidinta la rajdanton kaj facile neŭtrigis lin, blovante kelkajn flamojn el la anguloj de sia faŭko. Sed de tiam la aliuloj, supre, daŭre laboregis... Per distiritaj okuloj Drak'Jon miregata ekvidis, ke liaj piedoj ne plu estas dolĉe baniĝantaj en la akvo-fluejo sed tute sur seka grundo. Junulino, bela kiel glicineo, kuŝis tie, kuntiriĝanta, premanta kruĉon ĉe sia korpo.

Drak'Jon longtempe rigardis. Kiam la suno subiris li daŭre gardis ŝin. Li kredis, ke ŝi levigas, etendas al li sian dolĉan, parfumitan manon; ke li aŭdas ŝin kanti, kuri en la arbaro, ridanta.. Li ekdeziris kaŝludi kun ŝi, aŭdi ŝin paroli pri la vivo de la vortoj kaj amo al ili. Ŝi malespere dormadis. Li volis veki ŝin, denove briligi vivojn en ŝia rigardo kaj provis stariĝi ŝin... Milfoje li provis, milfoje vane. Koler-ega post tiom da malsukcesaj provoj, li gruntis, malbenis la potenculojn surterajn kaj enĉielajn.

Per furioza piedfrapo li ŝiris la rokon. La akvo enfermita en la centro de la tero, vekita de la tremado, eskapis, finfine libera. Sub la diluvo la vilaĝanoj ebrigiĝis, aŭskultis la akvon de la fontoj, de la kaskadoj, de la riveroj. La muziko de la akvo, de la retrovitaj vortoj, plezurigis iliajn korojn. Pro tiel granda feliĉo Drak'Jon ellasis dolĉan larmon, kiu ŝtelŝoviĝis ĝis Glicinea. Tiam li denove ekdormis apud sia homarpeceto.

Hodiaŭ Drak'Jon daŭre vivas. Li dormas apud Glicinea, kiu ĉiujare denove floras. Kun la sezon-akvoj miksiĝas la vortoj. Lasu ilin danci kaj luli Drak'Jon... Sed estu singardaj Jonanoj. Se hazarde revenus la silento tien kie ridas kaj ludas la vortoj, tiam, eble, Drak'Jon denove vekiĝus.

André Faivre  
Marie-Christine Gindreau  
Mado Giraudeau  
Marie-Pierre Jamet  
Jacky Jogue  
Francis Lempérière  
Patricia Proust  
Françoise Rouault  
Didier Tesson  
trad. P.B.



Ilustris: Michel Raimbaud

# Silvestro la Arbarmastreto

En la Vogeza montaro, alte apud la monteĝa vojo, kuŝis iam, en vasta herboriĉa paŝtejo ĉirkaŭita de fago- kaj abio-arbaro, malgranda farmbieno, kies nomo estis "La Melisse". Tra la domfenestroj oni ĝuis belegan vidaĵon al la ĉirkaŭaj montoj, al la fruktodona Rejnvalo kaj pli malproksime al la montaro de la Nigra Arbaro, mirinde bela frumatene, kiam la unuaj radioj de la leviĝanta suno kronas ĝian eĝon. Ifoje oni ekvidis eĉ la neĝkovritajn Alpopintojn superstarantajn la orientajn Jurasmontojn.

Tie vivis Petro sesjara knabo kun siaj gepatroj kaj Ludoviko, maljuna servisto. Petro ne havis ludkamaradojn ĉar en la proksimeco ne estis alia domo kaj la vilaĝo kaŝiĝis profunde en la valo apud la rivereto. Tamen li neniam enuis, tiom da aĵoj estis malkovrotaj en la domo, en la subtegmentaj kameroj, en la grenejo kaj fojnejo. La elektra kurento kaj la gaso ankoraŭ ne estis konataj en tiu izolita bieno. Vespere, kiam la suno malaperis malantaŭ la montaro, oni ekbruligis lignofajron en la granda kameno de la kuirejo, oni sinlokis apude, maljuna Ludoviko ŝtopis sian pipon kaj kutime diris al la knabo:

"Petro, rigardu ĉu la anĝeloj bone alkroĉis la stelojn kaj ekflamigis la lunon!" La knabon ĉiam plezurigis tiu dirado, ĉar li sciis, ke poste Ludoviko rakontos al li historietojn pri la kapreoloj, la sciuroj, la birdoj, pri ĉiaj arbarbestoj, ifoje ankaŭ pri la feinoj aŭ la elfinoj. Li ankaŭ instruis lin skulpti ŝipetojn el pinarboŝelo, fari pipetojn el glaningo kaj glanoj aŭ fajfilojn el lilako kaj sambukotigoj. Dumtage la knabo preferis vagadi tra la paŝtejo ĝis la arbarrando kun Diko, la luphundo, kiu ĉiam saltetis pro ĝojo. Petro ŝatis aŭskulti la pepadon de la birdoj kaj la kveradon de la turtoj, kiuj nestis sur kripliĝinta randfago.

Iun varman unitagon la knabo sola eniris pli profunden en la arbaron. Li gaje petolis kaj galopis post flirtanta papilio ĝis li sentis sin iom laca. Apud li staris giganta abio, kies radikoj formis sur la grundo kvazaŭ niĉojn; ĉu eble estis kuŝejoj de leporoj aŭ de kapreoloj, kiuj ĉi tie trovis ŝirmon kontraŭ la ŝtormo aŭ la neĝvento?

La knabo nestis sin inter du radikoj, aŭskultis la susuron de la vento en la foliaro, kiu sonis al liaj oreloj, kiel dolĉa lulkanto, kaj ekdormis. Subite li aŭdis voki nomon. Antaŭ li staris eta vireto tute vestita en helverda silka tuniko kun longa birdplumo sur la ĉapeleto. "Ĉu estas vi, kiu vokis min?" demandis Petro. "Jes", respondis la vireto. "Mi ne konas vin, kiu vi estas?" - "Mi estas Silvestro la tiea arbarmastreto. La homoj min ne konas; mi montras min nur ifoje al la infanoj, al la bonkoraj infanoj; kaj tiam nur dum la tago de la somera solstico." - "Kio estas solstico?" - "Estas tago plej longa en la jaro; la suno estas plej alte en la ĉielo; estas festotago por ĉiuj estaĵoj. Vi estas bona ŝanca renkonti min", respondis la vireto.

Nun Petro aŭdis flustradon; ŝajnis al li, ke la abio parolas. La koro de la knabo batis ekscitite kaj li mirege rigardis la vireton. Tiu ĉi ridetis kaj kapiĝis kaj aldonis: "Jes, estas la abio, kiu parolis. La arboj, la floroj, la bestoj, ĉiuj kreitaj estaĵoj parolas lingvon, kiun vi hodiaŭ komprenas. Venu; mi volas de vi admirigi mian reĝlandon" Kaj la vireto fajfis mallaŭte. Alflugis granda tetraono, kiu per rauka voĉo demandis: Ĉu vi bezonas min?" Silvestro prezentis Petron kaj diris: Bonvolu transporti min ĝis la dikaj kverkoj, mi petas." - "Suprigmu" knaris la tetraono. Apenaŭ ili sidlokiĝis sin, brrrrr.....la vivanta aviadilo plonĝis en la valon. Sub ili la arbfrondaroj preterŝoviĝis rapidege; malproksime la sunradioj kristale brilegis en la fluanta akvo de la riveretoj.

Ili alvenis en maljunan maldensan arbaron, kaj alteriĝis ĉe majestaspekta kverko, kiu ŝajnis kvazaŭ reĝo de la ĉirkaŭaj arboj. "Estu bonvenaj" diris la kverko. "Estas tre afable de vi mastreto viziti nin nun fiu bubeto." Petro pli kaj pli mirigita kaj iomete ĉikanita respondis: "Mi estas sesjara, mi estas granda knabo!". La kverko ridetis kaj respondis: "Mi estas pli ol kvarcentjara; mi vidis multajn homojn. Princoj kaj eĉ reĝoj ripozis sub mia frondaro; sed mi estas kontentega vidi vin. Jes, ja, vi estas granda, bonstatura knabo, kaj vi estas bonkora. La palumbo, kiu ofte observas vin de super la kripla fago raportis, ke vi faras nestojn por la birdetoj kaj

alportis fojnon ĉe la arbarrando por nutri la kapreolojn vintre. Sed diru al mi, de kelka tempo mi ofte aŭdas terurigan bruon; la birdoj sin kaŝas en mia foliaro kaj ombrego superflugas nin; ĉu tio estas vivanta estaĵo?" - "Ne, respondis Petro. Estas senviva maŝino konstruita de la homoj; aviadilo oni nomas ĝin. Ĝi transportas homojn, paketojn, leterojn, ktp. alilanden; ĝis tiuj landoj, kie lumas la suno, kiam ĝi jam subiris ĉe ni. Patro diras, ke ĝi estas danĝera nur kiam la homoj militas".

Nun preterkuris maljuna apro; kolere ĝi gruntis. "La homoj enkadrigas nun siajn kampojn kaj herbejojn per elektraj dratoj; oni eĉ nur iom frotas sian nazegon al tiu drataĉo, Pan! oni ricevas frapegon kaj oni ne vidas la frapinton. Tio kolerigas min" - "Estas la solulo," flustris Silvestro; "ĝi neniam estas kontenta; ĝi eĉ ne akordiĝas kun siaj samspeculoj." Per mansigno nun Silvestro alvokis cervon, kiu paŝtis ne tre malproksime, kaj petis ĝin transporti ambaŭ ĝis la riverarbaro. "Volonte, respondis la cervo afable; mi ĵus intencis viziti miajn gekuzojn. Ili ferias apud la rivero. Ekrajdul" Kaj li klinis sian kapon por ke ili al kroĉiĝu al la kornaro. Huiiii... La cervo galopis tra la arbustaro, supersaltis la heĝojn kaj la barilojn. Rapidege li alvenis en vastan arbaron. Tie ili renkontis ĉiajn gekonatojn: majestajn kverkojn, sveltajn fraksenojn, malhelfoliarajn fagojn, rondkapajn fraksenojn, acerojn sur kiuj aŭtune pendas flugilhavaj fruktoj, kies nomoj estas, laŭloke, nazpinĉiloj, flugantaj anĝeloj, papilioj, ktp. Ili ankaŭ renkontis ĉiam-verdajn pinojn kaj piceojn kaj, laŭlonge de la rivero, alnarojn. Oni ja scias, ke la elfinoj ŝatas ludi kaj danci en la nebulbenkoj de la alnejoj! Ankaŭ la arbustoj estis variaj: aveluoj, sambukoj, blankaj dornarbetoj, kies florojn, pensis Petro, avinjo kolektas ĉiujare por sia kortizano; la dolĉ-kolora kaprofolio, la erikoj, kies ruĝaj kłoŝetoj gajigas la senarbajn lokojn, la bluj mirtiloj kaj kelkaj malfruaj konvaloj, sed precipe asperuloj odoraj, kies blankaj steletoj brilegas super la verticilformaj folioj. Multajn du- kaj kvarpiedulojn li renkontis, plum- aŭ har-kovritajn. Jen aŭdiĝis frapado. Petro demandis: "Ĉu estas homoj ĉi tie?" - "Estas; ĉiam promenantoj en tiu arbaro ĉar ĝi situas apud granda urbo; sed la frapado estas farata de verda pego. Li senigas la arbojn, per sia beko fortika kaj pinta kiel bajoneto, de la danĝeraj ŝelinsektoj. Ni salutu lin." Ili alproksimiĝis al la bruo kaj Silvestro kriis:

"Bonan matenon verda pego; kiel vi fartas?" Verda pego eksaltis de malantaŭ malsana pino kaj respondis: "tre bone, dankon. Kaj vi afabla mastreto? Kaj ankaŭ bonan matenon al vi ambaŭ. Ho! Mi faras nur rapidan inspektion ĉi tie; la miksa arbaro ne ofte bezonas mian helpon; oni renkontas nur malmultajn malbonfarantojn en tiuj arbaroj. Ho ve! Estas tute alie en la ruĝmonta arbaro. Tie la homoj forhakis la fagojn, la acerojn kaj la ceterajn foliarbojn, lasinte nur la piceojn kaj kelkajn pinojn. Ventego faligis piceojn, kies radikoj ne estis rezistkapablaj post la forhako de la foliarboj. Tuj la ŝelinsektoj instalas sin, tunelis la ŝelon kaj baston, demetis siajn ovojn el kiuj eloviĝis detruaj larvoj, kiuj formangiĝis la kambiumon." - "Kio estas kambiumo? demandis Petro. Kaj Silvestro eksplikis:

"La kambiumo estas tavolo de ĉeloj, kiuj per la sukceso sendita de la folioj, kapablas fabriki novan lignoringon ĉe ĝia interna flanko kaj ŝelon ĉe la ekstera. La arbo produktas unu ringon jare. Do, se la insektlarvoj detruas la kambiumon, la sukceso ne povas plu cirkuli kaj la arbo pereas. Oni povas kalkuli la aĝon de arbo laŭ la nombro da jarringoj sur la ŝtipoj." - "Ĉu kelkaj el tiuj larvoj povas pereigi dikan piceon?" Petro timige aldonis. "Ho! ili estas ĉiam multnombraj," respondis verda pego: "Mi kalkulis po tri milionoj por ĉiu arbo, el tiuj fibestetoj. Feliĉe la nuna forstisto estas bravulo. Li helpas nin aktive, forhakante la falintajn kaj malsanajn piceojn rapide; tiel mi povas iomete ripozi kaj inspekti la aliajn arbarojn." "Sekve vi havas tempon por senraŭpigi min," kriis apuda kverko. - "Ne estas mia tasko; estas la laboro de la kukolo, de la rubekolo, flava motacelo, pirolo, najtingalo kaj de ĉiuj paseroj; ilin helpas ankaŭ la formikoj. Mi havas sufiĉe da laboro kun la danĝeraj ŝelinsektoj." Dume la laŭtparolilo de la arbaro, la buntplumara garolo, diskonigis la novaĵon, ke Silvestro la arbarmastro alvenis kun amiko, Petro la eta montulo. La arbaro resonis per galopadoj, sur la musko kaj foliotapiŝo alkuris cervoj, kapreoloj, leporoj, kunikloj, sciuroj, vulpoj kaj aliaj kvarpieduloj. Flugilbruetado kaj pepado anoncis la alvenon de ĉiaj birdoj. Ĉiu deziris alveni unua por saluti la vizitantojn. Tutlaste alglitis, kiel eble plej rapide, ŝvitanta heliko dirante: "Mi petas pardonon, mi iomete malfruas sed mi devis lavi mian konkon?"

Sed kokcinelo, kiu sidis sur la konko diris en lian orelon, tamen sufiĉe laŭte por ke ĉiuj ĉeestantoj aŭdu: "Ne estas bone mensogi; konfesu, ke vi estas tro pigra por kuri pli rapide". Ĉiuj ekridegis. Ne ĉiuj.... Eta fagido, tute nuda, korŝire ploris. Bela sinjorino forŝiris lian foliaron por fari bukedon. Ĉu ŝi ne sciis, ke la foliaro estas samtempe la vestaĵo kaj la pulmo de la arbo? La ĉeestantoj konsterniĝis. Povrulo, diris Silvestro. Malrespektema persono, kiu preferas foliaron baldaŭ velkontan (kiun ŝi forĵetos ĉe la vivrando aŭ en la rubujon), ol etan vivantan arbidon, kies suferoj estas nun teruraj!" - "La homoj tro ofte estas malrespektemaj" grumblis dika fago, "Ĉi tie venas miloj da homoj, piede aŭ per aŭtomobilo, kiel ili nomas tiun veturilon senĉevalan. Ili vundas nian ŝelon, premegas aŭ rompas niajn idojn; kial ili ne lasas la veturilon sur la vojo?" Jen dismovo okazis inter la arbarbestoj. Kapreolo sciigis, ke la pasintan semajnon vaganta hundo mordis lian idon; li ankoraŭ ne resaniĝas; li apenaŭ povas marŝi." - "Hi! hi! hi!, ploretis kunikleto, "tiu fihundo mortmordis mian patrinon". Sciuro kaŝanta en branĉa disforko aldonis: "Knaboj ĉiam ĵetas al mi ŝtonojn per ŝtonĵetiloj". Tiam altkreska kverko parolis: "Rigardu mian trunkon; ĝi estas tute kava. Antaŭ kelkaj jaroj aro da gejunuloj kampis tie kaj ekbruligis fajron. Ili dancis ĉirkaŭe; tio estis amuzega, sed la varmo hejtis mian ŝelon kaj detruis la kambiumon; poste la ŝelo falis. La fungoj, tiaj malbonaj mikroboj putrigis la lignon. Mi suferis kaj ankoraŭ suferas multe. Mi estis bela rekte kreskanta arbo. Mia ligno estis unuakvalita por la ŝipkonstruo. Mi revis pri belaj malproksimaj landoj; pri Ameriko, Ĉinio, la norda Poluso. Sed nun mi timas, ke vento faligos min teren kaj mi mortos mizere, senutile."

"Ĉu ĉiuj homoj estas krimuloj?" elbabilis maltima rubuso. "Ili disĵetas en miajn brakojn ĉiuspecajn difektitajn objektojn: karoseriaĵojn, kaserolojn, meblojn, grasajn paperaĵojn, pulvoro kiam malagrablaodoro. Ĉu la arbaro estas nun la rubejo de la civitoj? Iam la promenantoj estis pli puremaj!" - Rapide alvenis buteo; ĝi aŭskultis la plendaĵojn kaj post momento diris: "Mi revenas el la Alpoj. Tie mi vidis teruregan spektaklon. La neĝo amasiĝis sur la montoj; lun tagon pluvis kaj samtempe la Foenoblovis." - "Kio

estas Foenoblovis?", demandis Petro. "La foeno", respondis la buteo, "estas varma vento, kiu venas el Italio, disfandas la neĝon, ofte tro rapide. Ĉifoje la neĝo glitis, ĝi fariĝis lavango, terura lavango, kiu detruis kabanon, vilaĝojn, mortigis homojn kaj bestojn." - "Ne forgesu la terŝoviĝojn", aldonis bluparuo, kiu eliris el trueto. - "Kaj la inundo de la longvalo" pepis regolo. "Ĉio tio estas la konsekvenco de la eksternigo de la arbaroj sur la montoj", knaris granda nigra korniko. "Kutime la arboj, per sia branĉaro, siaj trunkoj kaj radikoj bremsas la falintajn gutojn. Ili penetras malrapide en la grundon kaj provizas la fontojn malsupre en la valoj. Kiam la arbaro mankas, la grundo malmoliĝas, la pluvgutaj glitas laŭlonge de la deklivoj, amasiĝas kaj alvenas rapidege en la valoj kaj kreas inundojn. Poste la fontoj sekiĝas dum la grundo sur la montoj fariĝas senfruktaj." "Ĉu ankaŭ nian domon minacas lavango?" demandis Petro. "Ne, Petro", respondis Silvestro, "viaj gepatroj vartas la arbaron. Mi vidas ilin ĉiujare helpi la arbariston malkovri la arbidajn de la sufokantaj fiplantoj. Cetere la abio - kaj fagoarbaro tre bone ŝirmas vian bienon." Subite oni aŭdis zumadon; estis abelregino, kiu preterflugis kun sia svarmo, kaj salutis la arbarmastreton. Silvestro fiksis nun ĉe la kaskedo de Petro kverkobranĉeton: tri folietoj kun du mirinde belaj glanetoj. Ĉiuj ĉeestantoj: arboj, floroj, bestoj aplaŭdis, ĝojkriis. La kampanulo sonorigis siajn cejanbluajn kloŝetojn; la luzuloj klinis siajn kapetojn; sed la ranunkolo ŝajnis ĵaluza, ĉar ĝi fariĝis iom pli flava. La violo modeste klinis sian kapon; ĝi aprobis la elekton, sed pensis en si "Ha! se Petro estus knabino, eble, Silvestro elektus min."

"Malfruas", diris Petro, "estas tempo hejmeniri". Du palumoj proponis rekonduki ilin ĝis la dika abio. Ili trafugis la ebenaĵon kaj la vitejon, kiu kreskas sur la montetaj deklivoj ĝis la kaŝtanaŭbo. Ili ripozis iomete sur dika pino, kies ŝosaro, de malproksime en la lastaj radioj de la subiranta suno, lumis kiel kristnaska arbeto. Poste ili enflugis la abiejon.

Ho! Kiom malvarmeta estis sub la kolonoj vicigitaj kiel soldatoj dum parado. Ili salutis, Silvestron, admonis Petron esti ĉiam bona al ĉiuj de Dio kreitaj estaĵoj..

Kaj Petro vekigis.....

# POR VIA DISTRO.

## SOLVO DE LA KRUCVORTA ENIGMO

|   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| M | A | R | T | E | L | D |   | M | A | L | S | A | T | A |
| A |   | G |   | B |   |   |   | I |   | U |   |   |   | N |
| N |   | R |   | O | S | T | R | O |   | R |   |   |   | T |
| T | R | U | T | O | E | T |   | A | D | O | R | I |   |   |
| E |   | O |   | A | R | D | E | O |   | A |   | K |   |   |
| L |   | B | P | V |   | L |   | B |   | U |   | V |   |   |
| O | R | U | L | U | M | I |   | O | R | I | E | N | T | A |
|   | L | G |   |   |   |   |   | R |   | I |   |   |   |   |
| E | K | O | N | I | B |   |   | R | E | D | A | K | T |   |
| I |   | O |   | F |   |   |   | I |   | O |   | A |   | N |
| R |   | A |   | P | I | L | K | O |   |   |   |   |   | S |
| K | A | E | T | O | C | O |   | M | O | R | T | I |   |   |
| A |   | O |   | R | I | R | L | I |   | K |   |   | G |   |
| U |   | M |   | A |   | T |   |   |   |   |   |   |   | N |
| I | M | P | O | S | T | O |   | I | M | P | E | R | I | C |

## NOVA ENIGMO

|                                                              |                        |             |                                                 |                                    |  |                           |  |                                |  |                                        |                |                                      |                                    |                |
|--------------------------------------------------------------|------------------------|-------------|-------------------------------------------------|------------------------------------|--|---------------------------|--|--------------------------------|--|----------------------------------------|----------------|--------------------------------------|------------------------------------|----------------|
| perplek-<br>siga                                             |                        | datali      |                                                 | malpla-<br>lau<br>kontrak-<br>to   |  | duatin<br>kun<br>transito |  | mutik-<br>instru-<br>ment      |  | estinta                                |                | prizor-<br>gri la<br>afaron<br>de ru |                                    | giganta        |
| kia la<br>dravol-<br>vigo de<br>Espo...                      |                        |             |                                                 |                                    |  |                           |  |                                |  |                                        |                |                                      |                                    |                |
| miksaĵ-<br>de<br>sonoĵ                                       |                        |             |                                                 |                                    |  | adverbo                   |  |                                |  |                                        |                | plezuro,<br>malaflik-<br>tiĝo        |                                    | hipo-<br>dermo |
| fariĝos<br>iun<br>kunmik-<br>saĵo                            |                        |             |                                                 |                                    |  |                           |  |                                |  |                                        |                |                                      |                                    |                |
| sur in-<br>donezia<br>veturilo                               |                        |             |                                                 | nomo<br>de la<br>sepa              |  | mal-<br>grand-<br>egulo   |  |                                |  |                                        |                | persona<br>pronomo                   |                                    |                |
|                                                              |                        |             |                                                 |                                    |  |                           |  | korpu-<br>lenta                |  | mizara<br>biblia<br>heroo              |                |                                      |                                    |                |
| mal-<br>konfid'                                              |                        |             | por koni<br>La opinio-<br>de la<br>publiko (sf) |                                    |  |                           |  |                                |  |                                        |                |                                      |                                    |                |
| inter-<br>jekcio                                             |                        |             |                                                 | pli ol<br>pep-<br>tun<br>sekvantan |  |                           |  | arbo-<br>vojo                  |  | nume-<br>rilo                          |                | adverbo                              |                                    |                |
| konsen-<br>ci                                                | sen-<br>valora-<br>ĵoj |             |                                                 | fidelul'                           |  | borde-<br>raĵo            |  |                                |  |                                        |                |                                      | oni ne<br>estas<br>certa<br>pri ĝi |                |
|                                                              |                        |             |                                                 |                                    |  |                           |  |                                |  |                                        | gmik           |                                      |                                    |                |
| konjunk-<br>cio                                              |                        |             |                                                 |                                    |  | grimpa-<br>stikil'        |  |                                |  |                                        | kontrak-<br>to |                                      |                                    |                |
| groupe                                                       |                        |             |                                                 |                                    |  | filino<br>de<br>kadmo     |  |                                |  | prepos-<br>kun dis-<br>divida<br>senco |                | karas-<br>forme :<br>Manjo           |                                    | pingl-<br>arbo |
| faritan<br>en la<br>kaptita<br>planto                        |                        | superega    |                                                 |                                    |  |                           |  | respek-<br>toplana<br>al Dio   |  |                                        |                |                                      |                                    |                |
|                                                              |                        | ankaŭ<br>ne |                                                 |                                    |  |                           |  | La 25 <sup>a</sup><br>elemento |  | sorta,<br>rava                         |                | mil<br>por<br>atenti-<br>ĝi          |                                    |                |
| akiri<br>femon                                               |                        |             |                                                 |                                    |  |                           |  |                                |  |                                        |                | kemia<br>prefikso                    |                                    |                |
| kvalifikes<br>kes<br>nombro<br>konstan-<br>de<br>molorisakoj |                        |             |                                                 |                                    |  |                           |  |                                |  | turka<br>oficiro                       |                |                                      |                                    |                |

# LA VIVO EN GRESILLON

## KOMITATKUNSIDO DE LA 16-17/01/99 EN BOURESSE

Ĉeestis: S. Bourot, C. Bureau, G. Dairon, M. Th. Lloancy, P. NAULET, Ch. Rivière.  
Senkulpigitaj; D. Babin, D. Gourdon, G. Lagrange, J. Vincent.

Ni kuniĝis inter la 16-a de sabato 16/01 kaj la 14-a de dimanĉo 17/01.

Unue ni legis la leteron de J. Vincent, kiu opinias, ke ni devas: prepari programon por staĝoj en Grésillon venontan someron, farigi la necesajn prilaborojn en la kuirejo, mendi de EDF (la elektrokompanio) la proponitan eksteran konsum-komputilon.

P. Naulet cirkuligis la leteron de la Subprefektejo, laŭ kiu la Sekurkomisiono decidis unuanime, la 11-an de decembro, ke ni rajtas venontsomere uzi la teretaĝon de la kastelo (krom kuiri, antaŭ ol farigi en la kuirejo la konsilatajn laborojn). Por uzado de la klasĉambroj, butiko kaj granda salono, la Komisiono postulas kelkajn plibonigaĵojn, kies parton proponas fari, laŭ la konsiloj, kiujn proponis surloke doni al ili la ĉefo de la Baugé-a fajrobrigado, la edzoj de C. Bureau, M. Martineau kaj P. Naulet. Tiu ĉefo povus veni kiam okazos en Grésillon la venonta komitatkunsido la 01/05/99.

M. Th. Lloancy sciigis: pri sia renkonto kun C. Trautmann, Ministrino pri Kulturo kaj Komunikado, kiu konsilis, ke ni kontaktu la Direktoron pri Kultutaj Aferoj por la regiono "Pays de Loire"; laŭ alies konsiloj, oni petu ankaŭ monon de tiu instanco; pri la rezultoj de sia serĉado por trovi intervenontojn kaj akceptontojn en Grésillon inter la 22/07 kaj la 22/08/99. Tiuj estis sufiĉe multnombraj, tiel ke ni tuj povis ekskizi unumonatan someran programon, kiun ni preskaŭ finpretigis.

Ek de la sekvanta mateno, H. kaj J. Rapley metis ĝin en sian komputilon kaj aktive laboris. Ni povis, antaŭ ol foriri, legi la unuan projekton. Ch. Rivière ricevos la definitivan tekston kaj multobligos ĝin por baldaŭ disvastigi la "programon de Grésillon" laŭ la kutima aspekto.

Ni informis telefone D. Babin pri la opinio de la ĉeestantoj, ke ni devas, per la mondonacoj, farigi la plibonigaĵojn en la kuirejo, kaj li tuj sciigis al P. Naulet la nomon de la kutima plumbisto por Grésillon, sinjoro Guillet, por ke ŝi venigu lin.

La Raportanto

## ***En Grésillon dum la somero***

Malgraŭ la nunaj malfacilaĵoj, nia Kulturdomo proponos al vi kvar staĝojn en la monatoj julio kaj aŭgusto, sed oni ne povas tranokti en la kastelo.

de la 24-a ĝis la 31-a de julio: Lingvistiko, Vortaro kaj traduko: (D. Lévy)

Kantoj kaj gitara muziko, kun Monika Kimel

Kurso por komencantoj kun Przemek Grzybowski.

de la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto: Kurso por komencantoj (P. Grzybowski)

Kursoj de G. Lagrange kaj D. Moirand.

Kurso pri "patchwork" ( Marie Malézieux).

de la 8-a ĝis la 14-a de aŭgusto: Kurso de D. Moirand.

Jogo kaj Esperanto ( Rose-Marie Laveau )

de la 15-a ĝis la 21-a de aŭgusto<sup>2</sup>

: Kurso meznivela ( Ch. Rivière )

Teatro ( Sylvie Bonnet )

Kurso pri literaturaj, teatraj tekstoj (J. Dumoulin )

La aliĝilojn oni petu de kaj resendu al S-ino Vincent, 26bis rue de Milngavie, 49500 Baugé. Tél. 02 41 89 04 94.

Por la loĝado aŭ kampado rilatu kun Paulette Naulet, au Bourg 49490 Breil, Tél. 02 41 82 55 22.

## **NIA LIBRO-SERVO**

Ĝus alvenis la poŝtkartaj kalendaretoj por la jaro 2000. Malmultekosta donaco por viaj korespondantoj. Prezo de la ekzemplero: 2,50 fr. ( aldonu sendkoston ).

Petu la katalogon 1999. Vi certe trovos tion, kio mankas al vi.

### **KURSOJ**

Aliĝu al la perkorespondaj kursoj; vi progresos kaj perfektigos.

UNUAGRADA: 150 f. (Steleto) aŭ 250 f. ( programita )

DUAGRADA: 250 f.

TRIAGRADA: 200 f.

Informas: S-ino Vincent 26bis, rue de Milngavie, 49150 Baugé.


# GRAMATIKO PER BONHUMORO



“**Ĉu...** **ĉu** : uzota en senco demando ; ankaŭ en la senco de necerteco aŭ de dubo.

“**jen...** **jen** : signifas “ iufoje... alfoje “.


**aŭ...** **aŭ** : montras alternativon “.



— Aŭ vi pagas al mi tiun katpeltan ĉapelon, aŭ vi ne plu havos edzinon.



— Li ne povis decidiĝi, ĉu legi, ĉu manĝi.



— Mi povos jen rigardi la eksteron, jen akcepti la eksteron en mian ĉelon

# Niaj perantoj

**Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

**Belgio** : Librovendejo Kariljono, vzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

**Britujo** : Les Hartridge, 74 Devonshire way, Croydon CRO 8 BS (10 pundoj)

**Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

**Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

**Germanio** : A. Rudolf, Dochsbergstr. 1, D. 34225 BAUNATAL pĉk Frankfurt / M (2759 35 - 609)

**Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

**Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

**Japanio** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiōziši TOKYO-

**Jugoslavio** : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

**Nederlando** : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

**Nov-Zelando** : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

**Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

**Portugalia** : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboā (2.800 esk.).

**Svedujo** : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

**Svislando** : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.)

**Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

**Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



## KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

### Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

## venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponono al :  
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 02-41-89-10-34